

ESPERANTO*INFO

*Informilo de Kataluna Esperanto-Asocio

ONI LIBERECANE PRESKAŬ-KONGRESAS

Katalunaj esperantistoj kongresas je ĉiu dua jaro, sed preskaŭ-kongresas pli ofte. Inter la 22a kaj la 25a de aprilo Kataluna Esperanto-Asocio (KEA) okazigis plurajn eventojn pri la esperantisma liberecana movado.

Merkredon la 22-an aprilo, eldonisto de SAT-eH Pedro Sanz klarigis al ĉeestintoj la enan historion de la libro *Memorindaj anarkiistoj kaj anarkiisma esperantismo*. Poste Miguel Fernández, kiu kompilis, tradukis kaj komentis la tekstaron, rakontis iom pli pri la enhavo de la libro: du eseoj de Federica Montseny pri Anselmo Lorenzo kaj Max Nettlau kaj *La proleta internaciismo kaj la planlingvoj* de Dolors Marin. Tiu lasta parto aperis hispane ene de libro *Anarquistas: un siglo de movimi-*



ento libertario en España (2010) kaj substrekas la rolon de Esperanto (kaj ankaŭ de Ido) por la iama grandega liberecana movado en Hispanio.

mokursoj pri Esperanto. Tiuj kvin-minutaj senpagaj lecionoj vekis la scivolemon de la Rambla-amaso. Multaj homoj, kiuj nenion sciis pri la lingvo interesiĝis pri ĝi.

ESPERANTO* CAT

*Associació Catalana d'Esperanto
Kataluna Esperanto-Asocio

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785. Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie Agnoskitaj)

Kotizoj por la jaro 2014-2015:
individua abonanta membro, 64 eŭroj;
pensuloj: 50 eŭroj; individua subtenanta membro, 128 eŭroj; juna membro, 25 eŭroj.

Banko: Caixa d'Enginyers,
Agència 001, Barcelona
Kontonumero: 3025 0001 15 1433398158
IBAN: ES54 3025 0001 1514 3339 8158
UEA-konto: kaea-b
CIF: G-58338567

Plenumkomitato:
Prezidanto: Josep Franquesa;
sekretarioj: Xavier Alcalde kaj Gemma Armadans; vicprezidanto: Carles Vela;
kasisto: Sebastià Ribes; voĉdonantoj: Alfons Tur, Llibert Puig, Montserrat Franquesa kaj Ramon Perera.

Apartat/Poŝtkesto 1008
08200 Sabadell (Vallès Occidental),
Països Catalans/Kataluna Landaro
Tel. 937 109 636; Fakso: 937 163 633
Ret-adreso: info@esperanto.cat
Ret-paĝo: www.esperanto.cat

Kiel kutime kiam Miguel prelegas, li kantigis la ĉeestantaron, kiu kune kantis Ek al barikadoj! kaj Idoj de l'popolo!, preskaŭ himnoj liberecanaj elhispanigitaj de Miguel mem.

La prezentado okazis en Espai Obert en kvartalo Sants kaj je la fino la ĉeestintoj iris al La Taverna del CAT en kvartalo Gràcia, kie okazis koncerto Kantoj en Esperanto de Xevi Rodon (gitaro kaj voĉo) kaj Àngel Ribas (akordiono). Rodon komencis per valseto omaĝe al Herminia Puigsech liberecana batalantino de Mataró. Poste sekvis kantoj de la enlanda milito kiel En la fronto de Gandesa, kantoj kontraŭmilitaj kiel La dizertonto aŭ internaciismaj kiel Jen nia mondo. Ankaŭ Miguel Fernández kunkantis kun Xevi Vortoj por Julia-n kaj Kanto al la liber'-n.

La 23-a estas tago de Sankta Georgo kaj tiutage stratoj ĉiam plenplenas de libroj kaj rozoj en Katalunio. KEA kiel kutime partoprenis la feston per budo en La Rambla. Miguel Fernández subskribis siajn librojn al aĉetantoj kaj la samon faris Pedro M. Martín Burutxaga kun sia *Malgranda proverbaro kataluna-Esperanto*. Kiel pasintjare, dum la tuta tago estis ful-

Vendredon je la sesa vespere, esperantistoj denove renkontiĝis en placo Katalunio. Historiisto Dani Cortijo promeniĝis nin tra la Ramblo kaj montris la spurojn de la liberecana kaj anarkiisma movadoj en la urbo, ekde la vizito de Fanelli en 1868 ĝis fiaskita provo de atenco kontraŭ diktatoro Franco en 1947. Cortijo montris la lokojn de la revoluciaj tagoj de julio 1936 aŭ tiuj de la bataloj inter komunistoj kaj anarkiistoj ene de la respublika flanko en majo 1937.

Horojn antaŭe, Joan Català debatis pri "la perfekta lingvo" dum programo Para todos en publika hispana televido. La Muzeo de Esperanto de Subirats kaj María Villalón kantante La pluvo-n dum lasta hispana E-kongreso en Ronda ankaŭ rolis en la programo.

Sabaton la 25-an okazis arta vespero en Espai Obert. Ĥoro de Ateneu Llibertari del Poble Sec kantis esperante Ek al barikadoj! aŭ Al Durruti. Pluraj katalunaj esperantistoj kantis, deklamis poezion aŭ prezentis rakontojn. Komuna vespermanĝo en kvartalo Sants metis finon al memorinda semajno.

Javier Guerrero

KVAR KATALUNOJ PARTOPRENIS LA 8AN MEZORIENTAN KUNVENON EN TUNISIO

De la pasinta 28a de marto ĝis la 1a de aprilo okazis en la internacia kulturcentro de Hammamet (Tunizio), la 8a Mezorianta kaj Nordafrika Esperanto-Kunveno. Ĉi-jare, kelkaj tagoj antaŭ la aranĝo, okazis atencoj en la ĉefurbo de la lando, sed ankaŭ okazis la Monda Socia Forumo. Tial, krom la interkultura dialogo, kiu normale karakterigas tiun eventon, elstaris la internacia solidaro al la tunizia popolo.

Rimarkindas, ke pluraj aliĝintoj ne povis finfine partopreni, ĉar pluraj aviadoj estis nuligitaj. Tio, ekzemple, okazis al deksesoj da polaj aliĝintoj.

Subtenis la aranĝon Asocio de Amikoj de la Medino de Hammamaet kaj en ĝi partoprenis, ankaŭ, grupo da kvar katalunoj, nome Gemma, Mauro, Saioa kaj Xavi. Ni prezentis, i.a. prelegon pri la rilato inter lingva justeco kaj militoj. La rekontiĝon kompletigis sinsekvo da vizitoj al la Muzeo de Bardaŭ —mond fama pro ties kolekto de mozaikoj—, kaj al la antikva urbo Cartago, al la urbeto Sidi Bu Said' kaj al la urbo Kajruano, la unua islama urbo de Magrabo.

Venontjare, la 9a Mezorianta Kunveno okazos en Turkio, en la regiono Kapadokio.

Xavier Alcalde

EN BONAERA TELEVIDO

La pasintan 27an de majo, la sekretario de KEA Xavier Alcalde, partoprenis skajpe en la televida programo *Con el Foco en Catalunya*, (Fokuse en Katalunio), elsendata ĉiusemajne el la Kataluna Ejo de Bonaero. Temas pri tridekminuta intervjuo kiu, kvankam la plibonigendaj sonkondiĉoj, proponas panoramon pri la originoj de Esperanto kaj de ties situacion en la Kataluna Landaro kaj tutmonde.

Danke al la intereso kiun la intervjuo vekis al la spektantaro, la sekvan semajnon la programo denove pritraktis la temon kaj intervjuis Antonio Ferrer, bibliotekisto de la esperanto-asocio de Bonaero, por profunde pritrakti la ligilojn inter la esperanto-movado kataluna kaj argentina.

EN TESTPROGRAMO TELEVIDA

La pasintan 20an de majo ni ricevis tre agrablan viziton. Kataluna kompanio produktanta televidprogramojn ĉeestis unu el niaj kursoj de Esperanto kaj la konversacian rondon por surbendigi kaj intervjui kelkajn partoprenintojn pri iliaj spertoj en la esperanta mondo, pri la kialoj lerni la internacian kaj pri niaj vidpunktoj rilate al la lingva situacio de la mondo.

Kelkajn tagojn poste, kelkaj membroj de KEA estis invititaj de la sama kompanio partopreni en surbendigado de la pretiĝanta testprogramo televida.

Estis granda plezuro partopreni tiun aranĝon kaj samtempe interesa sperto por koni kiel funkcias la televida mondo de interne. Estis granda ĝojo vidi la nuntempan pozitivan bildon kiun oni havas pri Esperanto, tute for de la kliŝoj kaj de la malkono kiun ni ofte renkontas.

Alfons Tur

LA MUNICIPALAJ BALOTOJ KAJ LA LINGVA DIVERSECO

Flanke de ĉies voĉdonaj preferoj, estas nekutime, ke la katalunaj politikaj partioj tradukas ties kampanjan materialon al aliaj lingvoj. Tial, ni volas elstarigi la penon de la kandidat-listo Barcelona en Comú, proponanta sian materialon en Esperanto, en la ĉina, en la gvarania, en la rumana, en la portugala, en la persa, en la itala, en la urdua, en la greka, en la finna, en la angla, en la araba kaj en la turka.

Ni, do, salutas tiun rekonon al la graveco de la lingva diverseco kaj de la diversaj

lingvaj komunumoj loĝantaj en Barcelono. Estus bele se la aliaj partioj sekvus la ekzemplon de tiu iniciato kaj plurlingvigus sian kampanjan materialon. Tial, la 24an de majo, ni ĝuus balotadon, ne nur demokratian kaj liberan, sed ankaŭ lingve daŭripovan.

CASTELLDEFELS: LA BIBLIOTEKO REAKIROS SIAN ORIGINALAN NOMON: RAMON FERNÁNDEZ JURADO

Dum la unua plenkunsido de la Castelldefels-a municipo, la 23-an de julio oni voĉdonos pri la nomŝanĝo de la urba Centra Biblioteko kiu denove rekiros la nomon Biblioteca Ramon Fernández Jurado. La nomo estis ŝanĝita de de la antaŭa municipa gubernio apartenanta al la Partido Popular. Tiu ĉi punkto de la tagordo sukcesos dank' al la favoraj voĉdonoj de la nuna plurpartia municipa gubernio kaj tiuj de CiU.

La nomo de la nova kultura ekipaĵo, inaŭgurita la 23-an de aprilo de 2012 estis siatempe polemika ĉar la Popola Partio profitis la translokigon de la biblioteko por ŝanĝi ties nomon al tiu de Biblioteca Central, kaj tiel forigi tiun de la profesoro, poeto, laborista aktivulo, socialista politikisto, kaj esperantisto Ramon Fernández Jurado. Lia nomo estis flankenmetita kaj nomis nur la plurfakan salonon de la biblioteko.

Ramon Fernández Jurado luktis dum la hispana intercivilita milito en la vicoj de la Partio de Marksista Laborista Unuiĝo (POUM), en 1938 estis kaptita de la faŝismaj trupoj kaj kondamnita al 30 jara enkarceriĝo. En la municipal balotadoj de 1983 li estis elektita urba konsilanto de la municipo Castelldefels kaj en 1984 li estis elektita kataluna deputito. Li forpasis la 26-an de junio de la sama jaro kaŭze de stomakkancero kaj du jaroj poste la urbo Castelldefels kie li loĝis dum siaj lastaj jaroj omaĝe al li nomis Ramon Fernández Jurado la urban bibliotekon.

La nuna Centra Biblioteko, konstruita de la arkitekto Josep Muxart postulis investon de 6 milionaj da eŭroj de la Barcelona Metropola Areo kaj de 800.000€ de la Castelldefels-a municipo por la mebligo kaj disponigo de teknologia kaj bibliografica fonduso. Ĝi disponas de 4021m² de uzebla surfaco, kompare al la 900m² de la malnova Biblioteko Ramon Fernández Jurado lokita en can Roca.

<p>37è CONGRÉS CATALÀ D'ESPERANTO</p> <p>Mataró (Maresme) 30, 31 d'octubre i 1 de novembre 2015</p>		<p>37a KATALUNA KONGRESO DE ESPERANTO</p> <p>Mataró (Katalunio) 30an, 31an de oktobro kaj 1an de novembro 2015</p>
--	---	---

LA URBESTRO DE SABADELL INAŬGURIS LA BIBLIOTEKO-ARĤIVON PETRO NUEZ

La urbestro de Sabadell, Juli Fernández, akompanata de la magistratano pri kulturo, Montserrat Chacón, inaŭguris la pasintan 4an de julio la novan ejon de la Biblioteko-Arĥivo Petro Nuez (BAPN), kiu enhavas librojn, revuojn kaj aliajn altvalorajn dokumentojn pri la historio de la kataluna esperanto-movado.

Sesdek kelkaj personoj plenigis la sidejon en tiu “grava evento kiu famigos la urbon Sabadell en la tutmonda esperanto-movado”, laŭ vortoj de Josep Franquesa, prezidanto de Kataluna Esperanto-Asocio. La historiisto Carles Vela, vicprezidanto de KEA, reliefigis la gravecon de Petro Nuez en la historio de Esperanto en Katalunio. Siaflanke, la urbestro Juli Fernández, rimarkigis la gravecon de Sabadell en la kataluna esperanto-movado kaj klarigis, ke nova kataluna respubliko sendependa devos klopodi, ke tiu urbo estu tutmonda gvidpunkto en la esperanto-movado. Tiu-



FERRIOL MACIP

sence, la urbestro kaj la lokaj esperantistoj pritraktis orkazigi internacian esperanto-konferencon en Sabadell venontjare.

La nova ejo de la BAPN ekzistas danke al amasfinancada kampanjo en la retejo Verkami, kiu sukcese finiĝis pasintjanuare.

SOMERA ESPERANTO-STUDADO EN SLOVAKIO

De la 11a ĝis la 19a de julio okazis en la slovak urbo Martin la jam tradicia Somera Esperanto-Studado (SES) organizita de Edukado@Interreto. La 190 partoprenantoj el 25 landoj lernis Esperanton matene en malsamaj klasĉambroj gvidataj de 8 instruistoj el 8 malsamaj landoj, posttagmeze okazis variaj prelegoj kaj atelieroj, kaj vespere estis la tempo por koncertoj, teatraĵoj kaj danco.

Kiel kutime la grupo de katalunoj estis sufiĉe nombra (11) kaj agema. Jordi Perera prelegetis en sia lernogrupa pri la historia subpremado de la kataluna lingvo kaj ege sukcesis en la Kulinara Festivalo per siaj “torrades amb tomàquet, escalivada i tonyina” kaj furoris la vina trinkado per la tradicia beko-kruĉo (“porró”). Viktoro Solé instruis grupon de komencantoj. Aldone, kadre de la internacia vespero, Maria Dolors Godoy deklamis siajn poemojn kaj Cecília Valls, Noa Aymamí kaj Martí Solé kantis kelkajn kantojn kun gitara akompano. Ankaŭ elstaris la kontri-



MARTA MOLINE

Maria Dolors Godoy deklamis siajn poemojn

buo de Xabi Rico, nia amiko “bertsolari” el Eŭskio, improvizante amuzajn versojn, kiuj ridigis la ĉeestantaron.

SES ne okazos en 2016, ĉar en la slovak urbo Nitra la sama teamo de Peter Baláz organizos la 101an Universala Kongreso.

PRELEGO KAJ ATELIERO EN TENDARO DE SERVAS

Pasintvendrede, la 24an julio, nia samideano Joan Català prelegis kaj atelierumis pri esperanto en Campament (Kampadejo) Jaume I d'Albocàsser (Alt Maestrat). Tiun kampadejon organizis SERVAS International, internacia ne-profitcela organizo kiu enhavas gastreton similan al Pasporta Servo sed ekstermovadan. La celo de tiu reto estas helpi al la starigo de mondan pacon, bonvolon kaj komprenon pere de personaj kontaktoj inter homoj el diversaj kulturoj, tradicioj kaj nacioj. SERVAS estas pacema organizo

fondita post la dua mondmilito ankaŭ de esperantistoj konsiderantaj ke milito ne plu eblos se la popoloj interkompreniĝas.

Ĉijare Kataluna Esperanto-Asocio estis invitita partopreni en tiuj labortagoj pri komunikado, kie ankaŭ okazis radi- kaj televidateljeroj, por diskonigi la internacian lingvon kaj ties situacion kadre de tutmonda interkonektita socio. Joan Català deklaris ke la gepartoprenantoj “rezultis tre dankemaj, ĝojegintaj kaj igantaj ilian prinescion al rimarkinda entuziasmo”.

Post la ateliero anino de SERVAS International kiu samtempe estas ĵurnalistino de RTVE (hispana publika radio kaj televido) faris al li intervjuon elsendotan la morgaŭon, sabaton la 25an, kadre de la programo “Sin Fronteras” (sen limoj) de Radio Nacional de España (hispana publika radio).

KEA volas danki la trakton kaj la simpatian de la organizantoj de SERVAS kaj sciigi al ili ke estis plezuro partopreni, kun nia eta kontribuo, en tiu labortago pri komunikado en la kampadejo Jaume I d'Albocàsser.

L'ASSOCIACIÓ CATALANA D'ESPERANTO CONDEMNIA LES DECLARACIONS SUPREMACISTES DE CAROLINA PUNSET

L'Associació Catalana d'Esperanto lamenta profundament les declaracions de la diputada de Ciutadans a les Corts Valencianes Carolina Punset, en què considera “aldeano” i inútil l'ensenyament en català, i on afirma que l'anglès és l'esperanto del segle XXI.

Considerem que el discurs de la Sra. Punset no és només desafortunat, sinó que és una apologia del supremacisme lingüístic hispanòfon i anglòfon i un insult als valencians que practiquen la llengua del país.

L'esperanto del segle XXI és l'esperanto. Que l'escola respecti la llengua pròpia és un dret reconegut per la Convenció dels drets dels infants. L'Unicef ens recorda que una educació basada en els drets és la via per acabar amb algunes de les desigualtats més arrelades en la societat.

Entenem que els drets lingüístics són complement indissoluble dels drets humans i que la diversitat lingüística és una part essencial de la diversitat cultural. Defensem el dret a la comunicació plena entre persones de llengües diferents, com a mitjà de superació dels prejudicis vers la cultura de la pau. Per això promovem l'ús del català com a llengua preferencial i vehicular de l'ensenyament a tot el seu territori lingüístic, també al País Valencià, al mateix temps que considerem que una llengua auxiliar internacional neutral com l'esperanto és la millor opció de democràcia lingüística, que garanteix els valors dels drets lingüístics, de la diversitat lingüística i del dret a la comunicació plena entre persones de llengües diferents.

Per tot això, l'Associació Catalana d'Esperanto condemna fermament les declaracions supremacistes de la Sra. Punset.

27 de juny de 2015

SOSTEN A DÀVID GROSCLAUDE, EN CAUMADERA HAME PER OCCITAN

Eth conselhèr regionau d'Aquitània Dàvid Grosclaude ei en cauma dera hame dempús deth 27 de mai passat, en tot reclamar qu'er estat e desblòque era creacion d'un ofici public pera lengua occitana, ua decision aprovada ara unanimitat pes conselhs regionaus d'Aquitània e Meddia-Pirenèus, mès qu'er estat francés e bloquège en sòn abitauau mensprètz envèrs es politiquas que tanhen es lengües nacionaus de França ath delà deth francés.

Er Ofici Public dera Lengua Occitana deu èster un organisme public qu'aurà eth prètzhet de definir ua politica publica en favor der occitan a escala de mès d'un territòri, damb era tòca de hèr trabalhar amassa es collectivitats e es operators sus eth terren. Ei a dèder, ua hiestreta unica entà Occitània tota ath marge des divisions regionaus, en çò que tanh as ahèrs de lengua. Organismes similars existissen en País Basc e en Bretanha.

Deuant tot açò, era Associacion Catalana d'Esperanto

- Sostèn era accion de Dàvid Grosclaude e ne manifestè era sua solidaritat
- Demane as autoritats catalanes, araneses e dera rèsta d'Occitània que sostenguen a Grosclaude
- Demane ar estat francés que prene eth compde era revendicacion de Grosclaude
- Demane ar estat francés un replantejament des sues politiquas lingüicides e culturicides
- Demane as entitats prò-drets umans deth mond que denòncien eth hèt e que passen ara accion

Era Associacion Catalana d'Esperanto compren es drets lingüistics coma complement indissoluble des drets umans, era diuersitat lingüistica coma ua part essenciau dera diuersitat culturau e eth dret ara comunicacion plea entre persones de lengües diferents coma mejan de superacion des prejutzats vèrs era cultura dera patz.

2 de junh de 2015